

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 21/11/2019 Kvarcentkvindektria eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **797,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **274,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **230,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.95



En paragrafo 92 P.A.G. klarigas la “derivitajn adverbojn”. Ilin oni kreas aldonante al radiko de alia kategorio la adverbajn finaĵojn “-e”:
vagonaro > vagonare; pensi > pense; malrapida > malrapide; plej > pleje;
malgraŭ > malgraŭe; du > due; re > ree; at- > ate La plej granda parto de tiaj adverboj originas en adjektivoj.

La adverboj plej multe difinas verbojn, sed sufiĉe ofte adjektivojn. Jen ekzemploj:

Kun verbo: “La infaneto dormas trankvile”; “La infano ludas regule en la parko kun siaj geamikoj”; “Hodiaŭ ni forveturos al Suomio”. “Estis varme dum la tuta nokto”. “Neniam forgesu poŝti ĝin”. “Evititu veni tro malfrue”. “Ŝi preskaŭ mortis”.

Kun adjektivo: “Tre granda arbo danĝere falanta”. “Ni restis tie preskaŭ tri horojn”. “Tio estas sufiĉe longa tempo”. “Li estas regule vizitanta membro”. “Ni elektis lin tutjare deĵoranta prezidanto”.

Kun substantivo (evitinda!): “La loko tie estas preferinda”. “Mi preferas la lokon aliflanke”.

Marcel Leereveld.



Ĉu estas Esperantisto vivanta en la mondo, pli aĝa ol Marcel?

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 16a de novembro estis la tria sabato.



Venis Roger, John, Michael, Chris kaj Ian

Roger Springer

Respondo pri 'Ne nur pri ĉevaloj'

Kara Roger,

vi tute pravas, kiam vi diras, ke vi devas manĝi aŭ morti. Tio ja validas por ni ĉiuj.

Sed neniel ekzistas premo, ke ni devas satiĝi helpe de (amasa) manĝado de viando bestturmente produktita.

Mi konsentas, ke la homa korpo estas konstruita por ankaŭ povi manĝi kaj digesti viandon. Sed tre malgrandaj kvantoj da viando absolute sufiĉus. Kaj homo kun normalaj enspezoj povas aĉeti tiun kvanton ekologie/liberaere produktitan.

Amike, **Peter Weide**



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Paca ripozo en mia ĝardeno.

VERBTEMPOJ: ĈU FACILAJ EN ESPERANTO ?

Jes kaj ne. La futuro ne havas problemojn. La pasinta tempo, la preterito, havas problemojn nur se oni imitas la eŭropajn lingvojn. Sed la prezenco, la estanta tempo, havas problemojn. Ne pro Esperanto, sed ĉar la estanta tempo havas necertan longecon. Ankaŭ la etnaj lingvoj havas tiajn problemojn. Ekzemple en la du najbaraj kaj similaj lingvoj angla kaj nederlanda, se mi nun atendas la aŭtobuson kaj atendis jam dek minutojn, la angla ne ŝatas diri *"I wait here for ten minutes"*, sed uzas prefere la daŭran tempon, la imperfekton *"I am waiting for ten minutes"*, mi estas atendanta dum dek minutojn". Sed la nederlanda ne ŝatas uzi tiun imperfekton, ĉar ĝi uzas plurajn vortojn: *Ik ben al tien minuten aan het wachten*. Do ĝi uzas la simplan Prezencon: "mi atendas jam dek minutojn". Same faras la germana kaj la franca, aldonante ĉiam la adverbcon "jam". Krome en la angla lingvo oni ofte preferas uzi la imperfekton, la nefinitan tempon, por simple esprimi la finitan prezencon: *It is four o'clock now. I am normally eating at six o'clock, but to-day I am eating at five*". Tio, kaj la longecoj de la nuno, kreas problemojn ankaŭ por Esperanto. Ni do iom pli profunde rigardu la aferon en Esperanto.

La unua afero kiu helpas pli klare scii la tempojn en Esperanto, estas trakti la verbon same strikte kiel ni traktas la substantivon, adjektivon, adverbcon, k.t.p. Kiam ni uzas la vorton "tablo", ni celas la tutan tablon, ne la tablon sen siaj kruroj. Se ni diras ke rozo estas ruĝa, ni ne celas ke parte la rozo estas flava kaj oranĝa: se la rozo estas ruĝa ĝia tuto estas



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

ruĝa. Se ni piediras rapide, ni ne piediras ankaŭ malrapide. La kompreno de la verbtempoj pliboniĝas, se kiam ni uzas la verbojn ni celas la tutan verbon, la verbon ekde komenco ĝis kun la fino. Do se mi promenas hodiaŭ, tio signifas ke mi kompletigas tiun promenadon el de komenco ĝis kun la fino, ne pli kaj ne malpli.

Krome ni devas kompreni, ke la nuno estas tre streĉebla kaj streĉenda tempo. Teorie la nun ne daŭras, kaj do ne kapablas enhavi agon, kiu ja bezonas minimumon da tempo. La homoj kiuj uzas lingvon en kiu oni esprimas en siaj verboj kiam la ago okazas, al kutimiĝis, por ke la ago povu okazi, inkluzivigi parton de la ĵusa pasinteco aŭ parton de la venanta estonteco, aŭ ambaŭ. Se ni diras "La vetero ĉi tie estas tre pluva", aŭ simple "ĉiam ĉi tie tre pluvas", tiu nuno, la sendaŭra nuno plus tiom da pasinteco kiom bezoniĝas, kaj plus tiom da estonteco kiom bezoniĝas por ankaŭ okazi en la nuno, ĉiuj kuniĝas por formi la estantan tempon, kiu ja uzas "-as". En ĉi tiu kazo, kiam pluvas ĉi tie ĉiam, la inkluzivaj pasinteco kaj estonteco nombras milionojn da jaroj, esprimitaj en la estanta tempo gramatika, per "-as". Sed kutime bezoniĝas nur iom da pasinteco aŭ iom da estonteco por realigi la estantan tempon, kiel en "Kiel ci vidas, mi manĝAS bananon: kaj :Mi jam maldormas duonan horon", kaj "Kiel ci vidas, mi hodiaŭ manĝas la manĝaĵon de hieraŭvespere". En la -as-tempo ĉiam devas inkluziviĝi iom da pasinteco aŭ estonteco. Tio estas natura neceso, kaj ne kulpas Zamenhof. Kaj tio ne estas problemo por ekz. la malaja lingvo, en kies verboj oni ne montras kiam la ago okazas; tion faras adverboj. Kvankam nia uzo de _as inkluzivigas iom da pasinteco (plej ofte) aŭ iom da estonteco, ni ne aldonas "-is" kaj aŭ "-os", do ne "Mi nun libertempisasos". Kaj la kutimo estas, ke kiam ni uzas "-is" aŭ "-os" (neniam kune !) ni neniam inkluzivigas la nunon. Do en "Mi ricevis leteron" mi certe ne ricevas ĝin nun, kaj en "Mi sendos leteron" mi certe ne sendas ĝin ankaŭ nun.

Do ni firme memoru **1.e**, ke kiam ni uzas verban finaĵon, do as, is, os, us, u, kaj i, ni celas kaj indikas ne parton, sed la tutan agon el de komenco ĝis kun la fino, kaj **2.e**, ke la -as-tempo ĉiam enhavas iom da pasinteco aŭ da estonteco. Sed ni povas adicii la tempojn uzante la verbon plurfoje, kiel en "Ni naĝis kaj nun naĝas kaj plu naĝos".

Proksimfoje iom pri la daŭra tempo de la verbo, la imperfekto.

Marcel Leereveld.



Pasigu memorindajn tagojn ĉirkaŭ la **Jarfino**, en gaja etoso, kun novaj amikoj, en belega loko, kun interesa programo. >> Venu kun geamikoj aŭ via tuta familio, kun ne-esp-istaj aŭ male.

Gustumu francajn frandaĵojn, varman etoson, kastelajn fantomojn. >> Post la silvestra festeno, dum maskobalo, ni dancu kune >> informoj:

gresillon.org/jarfino >> aliĝu ĝis novembrofino en gresillon.org/aligho

Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono, F-49150 Bauge-en-Anjou, telefona respondilo 0033-241 891 034, kastelo@gresillon.org



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Reklamo por Juna Amiko

Sendis al AE **Katja Steele**

- Allogaj nelongaj artikoloj, varia, aktuala temaro
- Bunte ilustrita, profesie pretigata
- Kreskigu vian legokapablon kaj lingvan nivelon!

Juna amiko



- Internacia redakcia teamo
- Rigora lingva kontrolo
- Spertu la realan lingvouzon
- Interkultura perspektivo

Aperas 4-foje jare, perpoŝte aŭ reta liverata.

Tarifoj por la kalendaro jaro 2020 en eŭroj:

	A-landoj	B-landoj
Papera	18	13
Reta	11	7

Perantoj en 35 landoj akceptas viajn abonojn.

Eldonaĵo de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti

Merkredvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaĵoj. Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

El Brisbano



Mia ĝardeno

Ne mil-unu plantoj, kiel en la ĝardeno de estimata Marcel, kreskas en mia ĝardeno sed nunaj dek-sep specioj floras en mia antaŭa ĝardeno kaj simila nombro en la malantaŭa ĝardeno. Bildoj montras diversajn speciojn. Preskaŭ ĉiam pasantoj fotas mian raran (*Delonix regia* var. *flavida*) Poincianan arbon kun allogaj flavaj floroj kaj belaj folioj. Kontraste kun ĝi estas la eleganta blua koloro de la supreniranta specio (*Plumbago auriculata*). Estis ' Plini la Olda' kiu nomis la planton. Li pensis ke *Plumbago* resanigas homojn el plumbo-veneniĝo.



La tria bildo montras mirindan ora-bronzokoloran orkideon (*Oncidium sphacelatum*). Multaj kunvenoj aŭ renkontiĝoj de Esperantistoj aŭ aliuloj okazis apud tiaj naturaj belecoj en la sudoriento de Kvinslando.



Peter Danzer

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE



Murdado de porko

La memoraĵo de Marcel en AE 452 pri murdado de porko , memorigis min pri simila travivaĵo. Mia avino sendis min kaj mian fratino en vilaĝon , apud la urbo Quimper, en Bretonujo, por ferii kun familio de ŝi konata kiam mi aĝis kvar aŭ kvin jarojn. Antaŭ la domo troviĝis la loko, kie estis mortigitaj la bestoj, kies viando nutris la tieajn loĝantojn . Kutime ili elturniĝis por ke mi ne sciu kio okazas en tiu konstruaĵo. Sed foje porko estis alportita en la



straton sur puŝĉaro antaŭ la domo kaj iu verŝis sur ĝin boligitan akvon . Alian fojon viroj frapis la kapon de bovo per peza ligna martelo . Mi ne scias ĉu mi tiam konsciis pri la krueleco de tiuj agoj , sed la bildoj certe restas gravuritaj en mia menso. Tio okazis kelkajn jarojn post la dua mondmilito, periodo de teruraĵoj , ĉu tiuj cirkonstancoj povas klarigi tiajn kondutojn?

Tamen mi certas ke nuntempe neniu porko estas kruele mortigita en Alĝerio. Pro tio ke islamo estas ŝtata religio ne estas permesite manĝi porkaĵon kaj bredi porkojn. Pro la kolonizado en la sesdekaj jaroj restis kelkaj lokoj , kie troveblis porkaĵo sed kiam islamo fariĝis pli strikta en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj ili malaperis. Eĉ la francoj , kiuj ĉasis aprojn en la arbaro, ĉesis tion fari , almenaŭ apud la ĉefurbo

Franciska Toubale



Esperanto por UN Informilo de la UN-oficejo de Universala Esperanto- asocio

Informilo 43 – novembro 2019

Informilo ligo, klaku mi petas

- Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio por la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 24 oktobro 2019
- Alvoko al lingva diverseco en la Civilsocia Konferenco de UN
- Mesaĝo al la esperantistaro por la Internacia Tago de Paco, 21 septembro 2019
- Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto 2019
- UEA funebras la forpason de Ludoviko Zaleski-Zamenhof



Universala Kongreso de Esperanto, aŭgusto 2020



3ZZZ

En la elsendo de la 18a de novembro estas menciitaj pliaj inventaĵoj de virinoj , pliaj reagoj pri la klimatsanĝo . Ĝi entenas ankaŭ novaĵojn pri Esperantujo



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE